

Instru-cirkulero okt.2005

Post la Pedagogiaj Tagoj en Herzberg mi klopodas rehavi la kutiman laborritmon. Mi gxojas pri la bona sukceso, la kontentvocêxaj reagoj, kore dankas al cxiuj prelegintoj, kontribuintoj pro la farita laboro kaj esperas, ke cxiu partopreninto trovis interesajxojn dum tiu fakkunveno. Pardonon pro la prokrastita dissendo de la partoprenlisto, sed montrigxis mankoj kaj eraretoj, kaj mi volis atingi perfektecon. Kelkajn fotojn kaj la artikolon, kiu aperis pri tiu evento en Harz Kurier, vi povas vidi cxe: <https://fotoalbum.web.de/gast/korody/pedtagokt05>

GRAVE: pretigxas datumbazo por pli bona trarigardo de E-instruado en Germanio kaj poste por helpi la pli bonan informadon kaj regulan fakan kunlaboron. Estas jam uzebla la reta versio de la enketilo-registrilo, kaj mi petas vin cxiujn plenigi gxin kaj informi ankaux aliajn gekolegojn pri tiu projekto. La formularon vi povas trovi cxe: <http://instrureg.laarts.info>. Koran dankon pro via rapida reago, resendo de informoj.

Mi klopodas regule dissendi aktualajn fakajn informojn, gravajn novajxojn al cxiuj, kiuj iel rilatas al, agadas por E-instruado. Do, jen mia fresxa cirkulero kaj aldone la adreslisto.

Kun multaj salutoj:
Zsofia Korody

1. Konkurso de infan-desegnajxoj (Esperanto en Vendomois: Jaro 2006)
Ni invitas cxiujn instruistojn, kiuj regule aux foje instigis siajn gelemnantojn al konkursa partopreno, sendi desegnajxojn al:

Esperanto en Vendomois, Les Monts FR 41330 Lunay
esperantoenvendomois@club-internet.fr

Novaj partoprenantoj, estu bonvenaj ! Konkursaj reguloj: Jara temo: El tiuj kvar elementoj, kiu(j) inspiras vin : AKVO FAJRO TERO AERO

Formato: Centimetraj dimensioj , minimume 40x30
Kategorioj A : gxis 7 jara
B : pli ol 7 gxis 10 jara
C: pli ol 10 gxis 14 jara

Limdato 25a de majo 2006

Dorse de la desegnajxo notu, esperantlingve, nomon, agxon de la infano, adreson de la lernejo au' de la E-klubo, kaj koncizan priskribon de la "verko". Premioj estos atribuitaj po 3 en cxiu kategorio. Cxiu infano ricevos partoprenan diplomon. Libroj, kasedoj, KD, T-cxemizoj konsistigos la premiojn.

Sebeto (Sébastien Merlet) maxmanseb2713@yahoo.fr

Tel. : [06-77-37-49-88](tel:06-77-37-49-88)

Vic-prezidanto de JEFO, Sekretario de Esperanto-Loiret, Trésorier du groupe GENEPI d'Orléans

<http://www.esperantomondo.net>, <http://esperanto.loiret.free.fr>, <http://sebeto.esperanto-jeunes.org>, <http://esperanto-jeunes.org>

2. Min multe interesas E-instruado en via regiono (t.e. en Germanio), mi sxatus kontakti viajn E-instruistojn, intersxangxi la spertojn. Cxu vi (iu el vi) konsentas?
Kiel pasis la Pedagogiaj Tagoj?

Kun estimo, Eugeno S.P. retadreso: Esperuzo@mail.ru
Esperanto-Centro, abon. jashik 140, Poch^tamt,
UZB-700000 Tas^kento, UZBEKISTANO, CIS